

EKO 2023

**Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro**

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**

EKO 2023 / 07. Januaro 30 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

ILEI raportas fidele kaj utile

Daŭras la esplorado pri la renvigo de la retejo de ILEI fare de la laborgrupo, konsistanta el Alessandra MADELLA, Cristina BOLLINI, Maximiliano GARCIA kiu kunlaboras kun la ĉefprizorganto Jozefo Nemeth. La celoj de renovigado estas krei pli allogan aspekton, konservinte ĉiujn ekzistantajn materialojn, krom la jam nebezonaĵoj kaj ne plu uzablaj. La Estraro sukcesis trovi senpagan helpon de la profesia programistino Cristina BOLLINI, membro de la itala sekcio. Ŝi multe laboris por kompreni kaj klarigi la sistemon kaj funkciadon de la retejo. Fakte la retejo de ILEI sidas sur la servilo, kies uzo estas disponebligata al ILEI senpage fare de E@I. Necesas esplori amason da materialoj kaj savi la plejmulton. Se plene ŝanĝi la retejon, tio kostus 2000-3000 eŭrojn kaj poste ILEI ne plu povus regi ĝin. Tial estas laborgrupo speciale aprobita fare de la komitato por la celo de renovigado. Jen detaloj: pri tio kaj la tuta agado de ILEI.

https://www.ilei.info/agado/2023-01-15_Raporto_pri_trimonata_periodo.pdf

The screenshot shows the ILEI website with a navigation menu on the left and a main content area. The main content area features a large circular graphic with the ILEI logo and a green star, announcing the 56th Congress in Lignano Sabbiadoro from August 8-12, 2023. To the right of the graphic, there is a text block with the following information:

La 56-a ILEI-KONGRESO
Tempo: Ekde la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2023
Loko: Lignano Orsabella (Itale: Lignano Sabbiadoro), Italio
Ĉef-temo de la Kongreso: "Instrui Esperanton en lernejoj"
Retejo de la Kongreso: <https://2023.kongreso.org/>
Por aliĝi kladu ĉi tie: <https://2023.kongreso.org/aliĝilo.php>
Jen la ligilo por rekte eniri la paĝon
https://2023.kongreso.org/ILEI_chefa.php
Ligo al la komplementa alvoko
[Fotof de Lignano Orsabella](#)

Novajoj

- 2023-01-15: Raporto pri trimonata periodo
- 2023-01-01: Ligo al la nova arkivo de IPR
- 2022-12-23: Biografio de Mireille Grosjean, la nova Honora
- 2022-12-18: La nova formularo por aliĝi al ILEI
- 2022-12-18: La nova formularo por aboni *Juna Amiko*
- 2022-12-10: Estrara jarraporto por la Komiteokunsido (2021-
- 2022-12-08: Teksto de Administrato de Lusa retarĝeto de Phi
- 2022-12-04: Invito al evento por la 110-a jubileo de Tibor Se
- 2022-11-19: Pri la enbavo de IPR 2022.4
- 2022-11-17: "La Stranga Butiko" voĉlegata de Stano Marček
- 2022-11-16: ILEI por la Tago de la Esperanta Libro (15-12-2

Jen la aspekto de la nuna unulingva retejo de ILEI, kiun fidele kaj persiste prizorgis tra pli ol 20 jaroj s-ro Jozefo Nemeth, sed efektive, ĝi ja montras sian aĝon.

Universitataj komunikoj

Dum la lasta universitata diskuto aperis la temo de revuoj kiuj publikigas artikolojn pri Esperanto/interlingvistiko ankaŭ en Esperanto.

1) JKI: Język. Komunikacja. Informacja (Lingvo. Komunikado. Informado) estis lingvistika revuo de la Universitato Adam Mickiewicz kiu aperis unufoje jare. Mi kunredaktis ĝin dum 10 jaroj (2010-19). Aperis entute ĉ. 840 paĝoj pri aŭ en Esperanto. Ĉiuj artikoloj havis Eperantan resumon. Dum la lastaj jaroj ankaŭ esperantlingvaj artikoloj aperis. Ĝia 10a jubilea volumo en 2015 estis dediĉta al interlingvistiko kaj esperantologio.

La numeroj elŝuteblas el la reto: <http://jki.amu.edu.pl>

2) Investigaciones lingüísticae estas lingvistika revuo de AMU al kiu mi transiris poste, tiel ankaŭ ĝi aperigas nun artikolojn pri interlingvistiko/esperantologio kaj eĉ en Esperanto. Vidu la numeron 2021: <https://pressto.amu.edu.pl/index.php/il> kie aperis jam artikolo pri esperantaj interjekcioj de Fabio Fortes, krome recenzo de Klaus Schubert pri nia postsimpozia libro *Rolo de lingvoj en interkultura komunikado*, raporto pri la GIL-konferenco de Kirilo Brosch. Kelkaj esperantistoj iĝis membroj de la Scienca Komitato de la revuo: Probal Dasgupta, Sabine Fiedler kaj Grant Goddall.

Mi atendas **artikolojn ĝis la 15a de februaro** por la sekva numero, pri interlingvistiko aŭ alia lingvistika temo, en Eo aŭ en alia lingvo.

Ilona Koutny

Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, Gvidanto de la Hungarologia Katedro

Kursoj en Finnlando, Kostariko kaj Koreio

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Esperantokurso
Gvidantonomo: Tiina Oittinen
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Turku, Finnlando.
Aldoninto: frans

Nomo: Kurso-
Gvidantonomo: Silvio Curtis
Tipo: Nova kursgvidanto
Loko: Monteverde, Kostariko

Nomo: Uam elementa lernejo
Gvidantonomo: Inhye Gim(Ella)
Tipo: Nova lerneja kurso
Loko: Gimhae, Koreio
Aldoninto: kih4860

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27503>

Nomo: Yulha elementa lernejo
Gvidantonomo: Inhye Gim(Ella)

Tipo: Nova lerneja kurso

Loko Gimhae, Koreio.

Aldoninto: kih4860

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27504>

Nomo: Esperanto kurso en KTC Busan dumviva edukejo

Gvidantonomo: Inhye Gim(Ella)

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Busan, Koreio.

Aldoninto: kih4860

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27505>

IPI interlingvistikas pluen

Nun haveblas [numero 122](#) de Ipl (Informilo por Interlingvistoj) kaj [numero 22](#) de Ifl (Information for Interlinguists)

<https://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2023/01/ipi-122.pdf>

Ipl kaj Ifl estas eldonitaj de Esperantic Studies Foundation (ESF) kunlabore kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ili disponigas informojn kaj ĝisdatigojn pri planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado, kun detaloj pri eventoj kaj novaj publikaĵoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliaj utilaj informoj por universitatoj kaj ĉiu, kiu interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj temoj.

Antaŭaj numeroj: <https://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/>

Simon Davies, redaktoro, ipi@esperantic.org

Fervojistoj – la nova numero 2023-1

La korilo montras la mirindan tegmenton de la renovigita stacidomo en Roterdamo. Sed la ĉefa temo estas la baldaŭa IFEF-kongreso en Antverpeno, Belgio. Plia ero estas la kunveno el projekto VERDEN en Ĉeĥio, Pardubice, kunlabore kun IFEF. Tio same formos en marto AMO-seminaron 99, la unua organizita en Ĉeĥio.

ALTE en Prago –malpli parolataj lingvoj

UEA estis reprezentita en Prago kaj en la kunsido de ALTE (lingvaj testantoj), kie la reprezentanto de UEA estas tiu, kiu prizorgis de multaj jaroj la rilaton kun ALTE, Zsófia Kóródy. Ni alkroĉas ŝian raporton.

[Rilatoj eksteraj – alkroĉu](#)

Aminda daŭre; Madagaskaro aktivas

La unua podkasto de Aminda Radio Esperanto por 2023 estas ĵus alŝutita en jutubon kaj de tie transiras al fejsbuko, linkedino kaj aliaj sociaj retoj. En tiu ELSENDO N°127 ni proponas al vi la sekvon de la rubriko pri la tradukado de la Biblio kaj ĝia influo sur la malagasa lingvo. Vi povas sekvi ankaŭ kelkajn novaĵojn pri Malagasio. Antaŭ ol aŭskulti la inicon al la malagasa lingvo, vi konatiĝos kun la konga Esperanto-artisto Zhou-Mack Mafuila. Ni bondeziras al vi sukcesan novjaron kaj agrablan aŭskultadon!

<https://youtu.be/9lpJdUZSUo8>

Henriel FIDILALAO, lot IAG 27 B Antoetra, G 102 AMBOHIDRAPETO, Madagascar

Ondo plue en la mondo

Rekorde ampleksa (139 paĝoj) kaj riĉa movade kaj kulture estas la decembra eldono de “La Ondo de Esperanto” (2022, N°314), aperinta je la novjarfesta nokto. Konatiĝu kun la prezento kaj enhavtabelo de la vintra (laŭ la nordhemisfera vidpunkto) “Ondo” kaj decidu pri (re)abono por 2023. Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2023/01/ondo-107/>.

Nov-Zelandano gvidas kurson en Aŭstralio

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Vere Joseph Williams

Gvidantonomo: Vere Joseph Williams

Tipo: Nova movada kurso

Lokoo: Crestmead , Aŭstralio

Aldoninto: Vere.

===== vortoj: 890 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikoj estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.